

informilo por interlingvistoj

ipi

28-a jaro (tria serio) | n-ro 108 (3/2019) | ISSN 1385-2191

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kaj Esperantic Studies Foundation

Contents

1. Mesaĝo de la redakcio	2
2. Lastatempaj eldonaĵoj: Libroj.....	2
3. Lastatempaj eldonaĵoj: Artikoloj.....	3
4. El la gazetaro	5
5. Disertacioj	5
7. Alvoko por referaĵoj: “Language and Migration: Experience and Memory” (Lingvo kaj migrado, travivado kaj memoro). 7-9 majo, 2020	6
8. Esperantic Studies Foundation: Lastatempaj subvencioj 2019	7
9. Lingva simpozio emfazis la bezonon ne nur paroli sed ankaŭ aŭskulti	8
10. Ateliero pri lingvoj okazas ĉe Unuiĝintaj Nacioj.....	9
11. Projekto “Militrakonto”	9
12. Fondaĵo por Lingvoj en Danĝero (FEL): Konferenco en Sidnejo.....	10
13. Kurso en Esperanto por universitaj instruistoj okazos en Krakovo	10
14. Printempa Renkontiĝo en Pekino	11
15. Tradukado kaj interpretado: Konferencoj kaj novaj eldonaĵoj.....	11
16. Listo de universitataj instruistoj kaj esploristoj kiuj konas Esperanton.....	11
17. Alilandaj esperantistaj instruistoj serĉataj por ĉina universitato	12
18. Laborgrupo ILEI/ESF pri universitata agado.....	12
19. Esperanto en la Ŝtata Universitato de Lokossa, Benino	12
20. Ukraina scienca konferenco.....	13
21. La iniciato Helsinki por plurlingveco en la scienca komunikado.....	13
22. Olga Ŝiliaeva reĝisoros la kongresan temon en Lahtio	14
23. Juna esperantisto alparolis la Junularan Forumon de EKOSOK: Aŭskultas Antonio Guterres.....	15
24. Esperanto ne evoluas?	15

25. Grant Goodall kaj Lee Miller estis elektitaj al la Akademio de Esperanto	16
26. Pli bona etoso por multlingvismo ĉe Unuiĝintaj Nacioj	16
27. Blogo traktas Esperanton kaj estontajn aranĝojn.....	18
28. Esperantologia Konferenco de CED en Lahti.....	18
29. Kolokvo en Lahti -- Esperantologio kaj Interlingvistiko: Venontaj Paŝoj.....	19
30. Estraro de ESF kunsidis en Bostono	20

1. Mesaĝo de la redakcio

En tiu ĉi numero vi trovos kiel kutime informojn pri aktualaj libroj kaj artikoloj, raportojn pri programoj kaj aranĝoj, kaj kelkajn informojn pri baldaŭ okazontaj aranĝoj. Notu ĉi-kuntekste anoncojn pri **la baldaŭ okazonta Esperantologia Konferenco** (sekcio 28, ĉi-sube), pri **la kongresfina kolokvo** pri Esperanto kaj interlingvistiko (sekcio 29) kaj la tre baldaŭa limdato por proponoj por la **konferenco pri lingvoj en danĝero** (sekcio 12).

Iom post iom ni komencas ricevi informojn por aperigo en *Informilo por Interlingvistoj kaj Information for Interlinguists*. Ni volas ricevi anoncojn pri estontaj aranĝoj, alvokojn por referaĵoj kaj artikoloj, aktualajn informojn pri novaj libroj kaj artikoloj, informojn pri disertacioj, raportojn pri okazintaĵoj, k.s. Ni apenaŭ havas tempon por redakti materialon kiun ni ricevas, kaj sekve ni aparte bonvenigos finpretigitajn anoncojn kiujn ni povos senprilabore enmeti (ideale dulingve eĉ – en Esperanto kaj la angla). Vi povas sendi ilin al ipi@esperantic.org.

2. Lastatempaj eldonaĵoj: Libroj

Collinson, William E. 2019. *La Homa lingvo/ Human language. Reeldono de pionira verko. Kun paralela traduko en la anglan*. Red. Angela Tellier, Wim Jansen. Trad. S. Davies. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. ISBN/ISSN 9789290171379. 254 p. <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9720>.

En 1927 William E. Collinson, profesoro pri la germana lingvo kaj honora lektoro pri kompara lingvistiko en la Universitato de Liverpolo, publikigis *La homa lingvo, viglan kaj interesan rakonton pri la funkciado de homaj lingvoj*, kiun li verkis komplete kaj originale en Esperanto. La nuna prinotita dulingva eldono – en Esperanto kaj la angla – enhavas redaktoran enkondukon, detalan notaron, indekson de personoj menciitaj, referencan literaturon kaj koncizan superrigardon pri la vivo kaj verkoj de Collinson.

Boulton, Marjorie. 2019. *At the Waters of Oblivion / Ĉe l'akvo de forgeso*. Trans. Pierre Lioni Ullman.

Available from Amazon:

https://www.amazon.com/dp/1092643001/ref=cm_sw_r_fa_awdb_t1_6wgQCbDCBSXSC?fbclid=IwAR0Egn60gc7Vv8-gmJ-KAC1eJw7s1UAp5iutZh0GwOdfiZ4ckFQLQeivQ5U

Tiu ĉi mallonga dramo de la Esperanto-poeto Marjorie Boulton (1924-2017) unue aperis en ŝia kolekto de unuaktaj teatraĵoj *Virino ĉe la landlimo* (Kopenhago: Koko, 1959). Paralela traduko angla/Esperanto.

Setz, Clemens J. 2018. *Ein Meister der alten Weltsprache: William Auld*. Verlag Das Wunderhorn. 24p. Havebla ĉe www.esperanto-buecher.de

“Antaŭ multaj jaroj hazarde iuj versoj de William Auld (1924-2006) venis al mi. Tiutempe mi ne sciis multon pri la planita lingvo Esperanto. Mi miris, ke mi povas kompreni la liniojn. Poste mi legis, ke Auld estis nomumita plurfoje por la Nobel-Premio pri Literaturo en la 90aj jaroj kaj apud la fino de sia vivo. Mi demandis min, ĉu iam estis iu ajn en la Sveda Akademio, kiu komprenis Esperanton. La origina literaturo en Esperanto estas grandega - kaj tamen preskaŭ ne ekzistas tradukoj en la germanan. Ĝi estas bela, riĉa paralela mondo de literaturo kun siaj propraj avangardanoj, klasikaj figuroj, fuĝintoj, geniuloj.” Teksto de parolado de la bone konata aŭstra aŭtoro Clemens J. Setz en Lyrik-Kabinett München. En la germana.

Castillo, José Vicente. 2019. *Los trenes de la esperanza, Esperantistas solidarios: niños y niñas austriacos en la región valenciana*. Cheste: Fundación Cajacheste.

“La verko de Castillo rakontas la historion de pli de kvarcent infanoj aŭstraj kiuj en 1920 estis akceptitaj provizore en Hispanio, pro la ekstrema malriĉeco en kiu Aŭstrio troviĝis post la Unua Mondmilito. Ĝi ankaŭ priskribas kiel evoluis la rifuĝado en la Valenciana regiono, la problemojn kiujn oni devis venki kaj la sorto-ŝanĝoj kiuj ekestis kaj en la vojaĝoj kaj en la situacio de la diversaj homgrupoj kiuj akceptis la rifuĝintojn. La temo de deviga enmigradoj disvolvita kaj la bezono de gastigo ankoraŭ ekzistas en ĉia sia severo en la hodiaŭa socio. Same kiel post la Unua Mondmilito grupo de aŭstraj infanoj fuĝis militon kaj mizeron danke al esperantista grupo de Cheste, hodiaŭ milionoj da homoj estas devigataj forlasi siajn landojn fuĝante malriĉecon, morton aŭ sisteman malobservon de iliaj rajtoj. En la nuna kunteksto, ni memoru, ke nia socio jam ricevis kaj daŭre ricevas migrantojn.” En la hispana.

Pecker, Jean-Claude. 2019. *Lamento (1944 – 1994) dulingva versio franca – Esperanto. Version bilingue français – espéranto*. Trans. Jean-Claude Roy. Paris: Z4éditions.

<https://z4editions.fr/publication/lamento-1944-1994-version-bilingue-francais-esperanto-dulingva-versio-franca-esperanto/>

Ok poemoj de Jean-Claude Pecker, astrofizikisto, honorprofesoro ĉe Collège de France. Li aĝas 96. Li povis ekverki tiun poemaron nur 50 jarojn post la malapero de siaj gepatroj en la koncentrejo de Auschwitz (ili estis deportitaj en 1944, la tagon de lia 21a naskiĝdatreveno). Li pasigis 10 jarojn por finverki la 8 poemojn. Estas sentempa kaj bedaŭrinde universala poemaro.

3. Lastatempaj eldonaĵoj: Artikoloj

Gobbo, Federico. 2019. International auxiliary languages. *International Encyclopedia of Linguistic Anthropology*. Wiley.

Gobbo, Federico & Russo, Federica. Epistemic diversity and the question of LinguaFranca in science and philosophy. Fina malneto. Aperos en *Foundations of Science*, ISSN: 1233-1821 (Prese) 1572-8471 (Rete). Lasta ĝisdatigo: 7 majo 2019. <http://philsci-archive.pitt.edu/16045/1/epistemic-diversity-question-LF-FGobboFRusso-final5-no-yellow.pdf>

Anglalingva resumo: *Epistemic diversity is the ability or possibility of producing diverse and rich epistemic apparati to make sense of the world around us. In this paper we discuss whether, and to what extent,*

different conceptions of knowledge – notably as justified true belief’ and as ‘distributed and embodied cognition’ – hinder or foster epistemic diversity. We then link this discussion to the widespread move in science and philosophy towards monolingual disciplinary environments. We argue that English, despite all appearance, is no Lingua Franca, and we give reasons why epistemic diversity is also deeply hindered in monolingual contexts. Finally, we sketch a proposal for multilingual academia where epistemic diversity is thereby fostered.

Harness, Lacy. 2019. The process of inventing fictional languages. Reta artikolo.

<https://www.boisestate.edu/presidents-writing-awards/the-process-of-inventing-fictional-languages/>

“Tiu ĉi artikolo resumas la historion de inventitaj lingvoj, priskribos la procezon laŭ kiu fikciaj lingvoj kreiĝas, kaj oridiskutos la malfacilaĵojn kaj rekompencoj de laboro kun produktistoj kaj reĝisoroj por krei lingvon por televida prezento aŭ filmo.”

Roehr-Brackin, K., & Tellier, A. The role of language-analytic ability in children’s instructed second language learning. *Studies in Second Language Acquisition*, 1-21. doi:10.1017/S0272263119000214
Eldonita rete: 28 majo 2019

<https://www.cambridge.org/core/journals/studies-in-second-language-acquisition/article/role-of-language-analytic-ability-in-childrens-instructed-second-language-learning/225B9D0AF2D00284969E35240B83217D>

La studo celis fronti el emperia perspektivo (1) la konceptan demandon de la rilato inter la kapablo kaj metalingva konscio per mezurado de ambaŭ konstruoj ene de la sama samplo de infanoj; (2) la demandon de stabileco respektive kapablo per rekta pritakso de evoluo tra la tempo ene de tiu sama infana samplo; kaj (3) la demandon ĉu kaj ĝis kiu grado oni povas antaŭvidi atingon en L2 inter junaj L2-lernantoj, kaj precipe kiuj kapablaj komponentoj asociiĝas kun atingo en kiuj L2-lertoj. Partoprenantoj estis 8-9-jaraj element-lernejanaj infanoj en Anglio: kvar grupoj ricevis instruon pri, respektive, la germana, itala, Esperanta lingvoj, plus Esperanto kun elemento de fokuso-je-formo en Fazo 1, kaj en Fazo 2 ĉiuj grupoj estis instruataj pri la franca kun elemento de fokuso-je-formo.

Curry, Mary, and Lillis, Theresa. Unpacking the lore on multilingual scholars publishing in English: A discussion paper. *ResearchGate*. 4 April 2019

En la pasintaj tri jardekoj, aperis aro da esploroj pri temoj rilataj al plurlingvaj fakuloj, kiuj verkis por publikigo, paralele al la kreskado de premoj al scienculoj tra la mondo, ke ili publikigu sian laboron en altstatusaj revuoj, precipe tiuj inkluzivitaj en specifaj gazetaraj indeksoj de citoj; tiuj citindeksoj tipe privilegias la uzon de la angla. Oni esploris plurlingvajn spertojn kaj perspektivojn de kleruloj, la sociajn kuntekstojn de ilia laboro, politikojn pri publikigo de esploroj, aspektojn de la tekstoj produktitaj de plurlingvaj fakuloj, kun kiuj specoj de homoj fakuloj interagis dum ili laboras siajn esplorojn, iliajn kunlaborojn kaj retojn, kaj pedagogiajn iniciatojn por subteni iliajn eldonajn agadojn. Tamen, dum daŭra esplorado estas farata, la ekzistanta esplorada bazo ne ĉiam estis konsultita laŭ signifaj manieroj. En ĉi tiu artikolo, ni uzas la nocion de "tradicio" por identigi iujn el la antaŭsupozoj aŭ ricevitan saĝon pri plurlingvaj fakuloj kaj iliaj verkaĵoj, kiuj ŝajne cirkulas. Post tio, ni argumentas ke esploristoj moviĝu preter la "tradicio" kaj pli forte uzu samtempe la rezultojn de empiria esplorado kaj rilatajn teoriajn kaj metodajn konversaciojn. Ni identigas direktojn por farinda estonta esplorado.

4. El la gazetaro

Charlemagne (ps.). A Brexit dividend. *The Economist*. 15 junio 2019, p. 46
La angla kiel ebla lingua franca en Eŭropo.

MacPherson, Hamish. Back in the day: The story of the Scot who was a genius in any language. *The National* (Scotland). 9 April 2019.
Pri Esperanto-poeto kaj Nobel-proponito William Auld.

Who do you speak Esperanto with?

The BBC on Esperanto, archived at:

<http://www.bbc.co.uk/voices/multilingual/esperanto.shtml?comment=response%23comment>

5. Disertacioj

Robin Rönnlund. "A city on a hill cannot be hidden: Function and symbolism of ancient Greek akropoleis." Disertacio prezentita al la Fako pri Historiaj Studoj en parta plenumo de la postuloj por la diplomo Doktoro pri Filozofio en la temo Klasika Arkeologio kaj Antikva Historio, Universitato de Gotenburgo, Svedio, 17 decembro 2018. En la angla. Resumo en Esperanto, p. 7.

6. Language Problems and Language Planning

La unua numero sub redakto de François Grin (Universitato de Ĝenevo), vol. 43, n-ro 1, 2019, aperis, kun jena enhavo:

François Grin. Redakta artikolo: The role of LPLP in a changing landscape.

Keith M. Graham k Zohreh R. Eslami. Attitudes toward EMI in East Asia and the Gulf: A systematic review

Eduardo Tobar Delgado k Mauro A. Fernández. Hacia una ortografía para el chabacano zamboangueno: Prácticas escritas y propuestas de estandarización

Basil Cahusac de Caux. Reviewing reform: Studies of script reform in contemporary Japan

Juan Jiménez-Salcedo. Los límites jurídicos de las políticas lingüísticas y la desterritorialidad del catalán

Jennifer J. MacDonald. Recenzo de Ng, P. C. & E. F. Boucher-Yip, red. (2017) *Teacher agency and policy response in English language teaching*

Tom Morton. Recenzo de de Zarobe, Yolanda Ruiz, red. (2016) *Content and Language Integrated Learning: Language Policy and Pedagogical Practice*

7. Alvoko por referaĵoj: “Language and Migration: Experience and Memory” (Lingvo kaj migrado, travivado kaj memoro). 7-9 majo, 2020



Parto 1, Novjorkurbo (loko decidota): ĵaŭdo 7 majo ĝis vendredo 8 majo.

Ĉefparolanto: Prof. Ingrid Piller, Profesoro de Aplika Lingvistiko, Macquarie University, Sydney, Aŭstralio.

Parto 2, Princeton University: vendredo vespere, 8 majo je 19.00 ĝis sabato 9 majo.

La konferenco okazos en la angla lingvo.

Lingvo estas nemalhavebla, sed ofte subesplorita, faktoro en la vivoj de migrantoj, enmigrintoj kaj rifuĝintoj. Ĝi havas rektan efikon sur la spertojn kaj elektojn de individuoj delokitaj de milito, teroro aŭ naturaj katastrofoj kaj la decidoj de agentoj, kiuj provizas (aŭ ne provizas) helpon, servojn kaj statuson. Kaj, distilite de memoro, ĝi formas la fikciojn, poemojn, memoraĵojn, filmojn kaj kantotekstojn, en kiujn migrantoj esencigas perdon kaj delokiĝon, integriĝon kaj malkovron, la tradukon de historio kaj kulturo, kaj la provojn de identeco.

Tiu ĉi interdisciplina internacia konferenco pri Lingvo kaj Migrado metos la rolon de la lingvo en la vivoj kaj verkoj de migrantoj en akran reliefon. En la unua parto, kiu okazos en mezurba Manhatano, ni invitos partoprenantojn konsideri kiel la lingvo malsame efikas la spertojn de diversaj homgrupoj: firme situitaj rifuĝintoj kaj enmigrintoj; portempe lokitaj rifuĝintoj kaj enmigrintoj, kaj homoj ankoraŭ survoje. Tiuj homgrupoj, siavice, estas diversigitaj laŭ aĝo kaj sekso, alfabeteco kaj edukaj atingoj, kulturo kaj religio. kaj ankaŭ laŭ la politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj medioj en kiuj ili celas ekloĝi.

La dua parto de la konferenco fokusiĝos ĉirkaŭ memoro en la kulturaj verkoj de migrintoj kaj enmigrintoj. En la vespero de vendredo la konferenco pludaŭros en la Universitato Princeton per legadoj fare de eminentaj romanverkistoj el inter la profesoroj, kaj en sabato sekvos plentaga simpozio pri memoro, lingvo kaj migrado. Por stimuli konversacion trans disciplinaj limoj, oni aparte rekomendos al partoprenantoj, ke ili ĉeestu ambaŭ partojn de la konferenco.

La interdisciplina Esplora Laboratorio pri Migrado: Homoj kaj Popoloj trans Landlimoj.

[\(Migration: People and Cultures Across Borders\)](#) konsistas el fakuloj pri kaj humanismo kaj socisciencoj; sekve, ni invitas proponojn el larĝa gamo de disciplinoj, inkluzive komparan literaturon, historion, tradukajn studojn kaj filozofion; politikologio, ekonomiko, edukado, sociologio kaj juro; socilingvistikoj, aplika lingvistiko, interlingvistiko kaj jura lingvistiko, interalie. La jenaj temoj estas urĝe interesaj, sed aliaj estas bonvenaj:

Lingvo kaj liverado de krizaj helpo kaj servado : Language and the delivery of crisis aid and services

Lingvo, ŝtato kaj enmigra statuso : Language, the state, and immigration status

Unuiĝintaj Nacioj, enmigrintoj, kaj lingva politiko : The United Nations, immigrants, and language policy

Lingvo kaj edukado por portempe lokitaj rifuĝintoj : Language and education for temporarily settled refugees

Tradukado, interpretado kaj lingvaj rajtoj : Translation, interpretation, and language rights
Lingvaj rajtoj kaj homaj rajtoj : Language rights and human rights
Protekto de interpretistoj kaj tradukistoj en konfliktaĵaj regionoj : The protection of interpreters and translators in conflict zones
La ekonomiko de lingvopolitiko en enmigrado : The economics of language policy in immigration
Lingvo, krimigo kaj deportado : Language, criminalization, and deportation
Lingvo kaj labormarkato : Language and the labor market
Ksenofobia lingvaĵo : Xenophobic language
Lingvo, dislokiĝo kaj ekzilo : Language, dislocation, and exile
Memoro kaj atesto : Memory and witness
La elprezento de migrado (teatro, video, radiodramoj, instalaĵoj ktp.) : The performance of migration (theatre, video, radio drama, installations, etc.)
Transgeneraciaj rakontoj : Cross-generational narratives
La migrado de teksto en popmuziko : The migration of lyric in pop music
Tradukado kaj la defioj de identeco : Translation and the trials of identity
Integrado kaj malintegrado en verkoj de enmigrintoj : Integration and disintegration in immigrant writing
Formo kaj ĝenro en la kulturo de migrado : Form and genre in the culture of migration
Lingvo, prestiĝo kaj malegaleco : Language, prestige, and inequality
Voĉoj de enmigrintoj: lingvoj, medioj kaj multkulturalismo : Immigrant voices: language, media, and multiculturalism

Kunsporas la konferencon Princeton Institute for International and Regional Studies, Esperantic Studies Foundation, kaj la Studo-Grupo pri Lingvo kaj UN.

Limdato: 1 novembro, 2019. Bonvolu sendi unupaĝajn proponojn pri 20-minutaj referaĵoj, kun indiko pri kiun el la du partoj de la konferenco via propono celas. Via propono estu en la angla lingvo kaj estu akompanata de vivpriskriba biografio. Sendu vian proponon al Prof. Esther Schor <eschor@princeton.edu>

8. Esperantic Studies Foundation: Lastatempaj subvencioj 2019

Steletoj indikas subvenciojn de la Programo pri Malgrandaj Subvencioj administrata de la Centro pri Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kaj financataj de ESF.

*Basak Aray (Turkio). Partopreno en la 16-a Kongreso pri Logiko, Metodiko, kaj la Filozofio de Scienco kaj Teknologio, Prago, por prezenti referaĵon pri “Fontoj de la lingvistiko de Peano”, €800

*Javier Alcalde, Roberto Pigro, Joseph Essertier. Podia prezento en la jarkunveno de la Internacia Asocio pri Kultura Historio pri “Esperanto kaj la Dua Mondmilito”, Tallinn, Estonio, €1600

*Bernhard Struck (University of St Andrews, Skotlando). Esplorprojekto “Esperanto kaj internaciismo inter la 1880aj kaj 1920aj jaroj”, \$1000

*Jordan Girardin (University of St Andrews, Scotland). Esplorprojekto “Esperanto kaj internaciismo inter la 1880aj kaj 1920aj jaroj”, \$2000

Alessandra Madella (Italio kaj Ĉinio). Partopreno en la Konferenco pri Multlingvaj Literaturoj, Universitato de Kimrio, €480

Petr Balaz (Slovakia). Subteno de Somera Hakatono (kodada maratono), €500

Krome, ESF faris signifajn donacojn de historie gravaj presitaj libroj kaj paperoj pri Esperanto kaj interlingvistiko al Biblioteko Du Bois Library de University of Massachusetts kaj Biblioteko Firestone de la Universitato Princeton.

Inter la programoj kiuj ricevas daŭran subtenon de ESF estas la korpusa projekto *Tekstaro*, la *interlingvistika programo* en Universitato Adam Mickiewicz (Poznan, Pollando), kaj la rete bazita programo de subteno al instruistoj *Edukado.net*.

9. Lingva simpozio emfazis la bezonon ne nur paroli sed ankaŭ aŭskulti

En mondo kie problemoj kaj ankaŭ solvoj fariĝas tutmondaj laŭ karaktero, ni devas lerni aŭskulti la mondon en ĉiu ties diverseco – en la lingvoj de ordinaraj homoj. Jen unu el la ĉefaj konkludoj de la Jara Simpozio de la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, kiu kunvenis en Novjorko la 9-an kaj 10-an de majo, 2019.

“**Aŭskulti, Paroli kaj Agadi en Multlingva Mondo**” estis la temo de la simpozio, kiu kunvenigis funkciulojn de UN, universitatanojn kaj lingvajn fakulojn tra du plenaj tagoj de prelegoj, referaĵoj kaj diskutoj.

La lingva dimensio de la laboro de UN, diris la simpoziaj partoprenantoj, estas ofte neglektata aŭ senkomente akceptata – ne nur la formala uzo de la ses laborlingvoj de UN (angla, araba, ĉina, franca, hispana, rusa) en UN, sed ankaŭ la interrilato de UN kun publiko kiu parolas eĉ milojn da diversaj lingvoj.

Dudirekta konversacio estas lingva defio kaj ankaŭ lingva neceso, ĉar UN bezonas la fidon de ĉiuj partioj, inkluzive de la granda publiko kiun ĝi servas – kaj senpere kaj pere de siaj membraj ŝtatoj.

Simpoziaj partoprenantoj notis, ke la Ĝenerala Sekretario de UN António Guterres laboras por forigi la mankon de atento al lingvaj demandoj. “Multlingvismo estas esenca valoro de Unuiĝintaj Nacioj,” lastatempe asertis la Ĝenerala Sekretario – precipe en kunteksto en kiu la 17 Celoj de UN pri Daŭripova Evoluigo ne estas atingeblaj sen aktiva kunlaboro kaj kontribuado de ĉiu socia nivelo.

Tri ĉefparoladoj emfazis kontrastajn aspektojn de tiu ĉi demando. Thomas Ricento, profesoro pri edukado en la Universitato de Kalgario, Kanado, kaj specialisto pri aplika lingvistiko, atentigis pri miskomprenoj pri la naturo de lingvo – miskomprenoj kiuj povas konduki al malbone formulitaj lingvaj politikoj. Ambasadorino Narjess Saidane, de la Internacia Organizaĵo de la Frankofonio, sugestis, ke lingva malegaleco subfosas la mesaĝon de UN kaj kreas senton de malplivaloro inter tiuj kiuj estas devigataj adaptiĝi al siaj lingve pli potencaj najbaroj.

Kontraste, la direktorino de internaciigo ĉe Facebook, Iris Orriss, montris al la fakto, ke Facebook larĝigas la gamon de lingvoj kiujn ĝi uzas, vastigante sian lingvan diversecon. Tiu malfermiteco al diverseco povus roli kiel utila modelo por UN, kiel diversaj partoprenantoj atentigis.

Inter la kontribuantoj al la programo en Novjorko estis ambasadoroj kaj iliaj reprezentantoj el Malio, Kanado, Portugalio, Hispanio kaj la Ligo de Arabaj Ŝtatoj, plus stabanoj el pluraj sekcioj de UN.


Subtenis la simpozion la Centro por Aplika Lingvistiko (Washington DC), Esperantic Studies Foundation, La Frankofonio, Universala Esperanto-Asocio, kaj aliaj. Birkbeck, University of London donis subtenon al paralela ateliero ĉe UN.

La Studogrupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj celas krei dialogon pri la lingva politiko de UN kaj pri ties uzo de lingvaĵo kaj lingvoj en interrilato kun siaj multaj publikoj.

La venontjara simpozio okazos la 7-an ĝis la 9-an de majo en Novjorkurbo kaj en Princeton, Novĵerzeo, sub la titolo "Lingvo kaj migrado: Travivado kaj memoro." Ĝin sponsoros interalie Universitato Princeton. www.languageandtheun.org

10. Ateliero pri lingvoj okazas ĉe Unuiĝintaj Nacioj

Kunlige kun la maja simpozio en Novjorko, estis aranĝita duontaga ateliero pri lingva politiko por oficistoj de UN ŝarĝitaj kiel kunordigantoj pri lingvoj en siaj respektivaj departamentoj. Partopreno estis limigita al 20 personoj. Gvidis ĝin Lisa McEntee-Atalianis (Birkbeck, University of London) kaj Francis Hult (Universitato de Lund, Svedio) kun helpo de Humphrey Tonkin. La ateliero celis identigi fortojn kaj malfortojn en realigo de la politiko de UN rilate multlingvismon. Subvenciis la aranĝon Birkbeck, University of London.



11. Projekto "Militrakonto"

Karaj amikoj kaj kolegoj,

En la lastaj monatoj, nia malgranda interreta muzeo kreskis ĝis 58 unuoj prezentantaj eminentajn individuojn, librojn, ĵurnalojn kaj organizojn de la Esperanto-movado dum la Dua Mondmilito. Ili kovras 24 landojn de Pollando ĝis Japanio, de Irano ĝis Hispanio.

<https://www.openedition.org/15929?lang=en>

Intertempe Catherine Gousseff, Sébastien Moret, Javier Alcalde kaj Pascal Dubourg Glatigny komencis kampanjon de intervjuoj kolektantaj memorojn de veteranaj esperantistoj, kiuj spertis la militon aŭ la postmilitan periodon. Ĝis nun ni intervjuis homojn en

Italio, Francio kaj Svislando. Ni varme dankas Vinko Markovo (SAT) pro sia afabla subteno en ĉi tiu iniciato.

Danke al la interveno de Ulrich Lins, ni provas savi unikan sonan dokumenton: 4-hora intervjuo farita en Londono en 1969 kun Nikolaj Rytjkov, sovetia aktoro malliberigita kaj silentigita pro esperantista aktivismo (1938-1946 kaj 1949-1955) kiu fuĝis okcidenten en 1965. Ni esperas, ke ĉi tiu grava fonto estos havebla por esplorado en la venontaj monatoj.

En la sekvanta novaĵletero, ni raportos pri nia partopreno en diversaj konferencoj kaj precipe en la Konference pri Kultura Historio, kiu okazos en Talino en junio.

Bonvolu ne hezitu kunlabori kaj sendi viajn proponojn por Militrakonto! Ni estas kreskanta kunlabora esplorkomunumo!

Pascal Dubourg Glatigny

12. Fondaĵo por Lingvoj en Dangero (FEL): Konferenco en Sidnejo

La alvoko por resumoj por la ĉi-jara konferenco de FEL estas nun videbla ĉe <http://www.ogmios.org/conferences/2019/>

La konferenco okazos en Sidnejo, Aŭstralio de 14 ĝis 16 decembro 2019.

La ĉeftemo estas "Kaŭzoj de endanĝeriĝo de lingvoj" – kaj en tiu ĉi Jaro de Indiĝenaj Lingvoj deklarita de UN, speciala temo pritraktos indiĝenajn lingvojn.

La limdato por 500-vortaj resumoj estas **1 julio 2019**. Pliajn detalojn oni trovos ĉe la supremenciita retpaĝo.

-- Nicholas Ostler, prezidanto, Foundation for Endangered Languages.

13. Kurso en Esperanto por universitaj instruistoj okazos en Krakovo

Kadre de **Cracow Language Teaching Staff Training Week**, okazos intensiva E-kurso por universitataj instruistoj de lingvoj el diversaj landoj, neesperantistoj, kiuj partoprenas Erasmus +, Staff Mobility for Training. La 20-hora kurso okazos de la 8-a ĝis la 12-a de julio 2019, ĉiutage. La organizanto estas la Jagelona Universitato (lingva centro). La titolo de la kurso estas: "Enkonduko al la esperantaj lingvo kaj kulturo" (Introduction to Esperanto Language and Culture). La kurson prilaboros kaj gvidos Maria Majerczak.

14. Printempa Renkontiĝo en Pekino

Sabate (la 9-an de marto) en pekina entrepreno Nanzhu okazis Printempa Renkontiĝo de esperantistoj, organizita de Pekina Esperanto-Asocio (PEA). En la renkontiĝo partoprenis pli ol 40 personoj el Pekino, Tianjin-municipo, Qingdao-urbo, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj Brazilo. Inter ili dek estas studentoj de Pekina Lingva kaj Kultura Universitato kaj Universitato de Internacia Komerco kaj Ekonomio, kiuj nun lernas Esperanton per kurso de PEA.

15. Tradukado kaj interpretado: Konferencoj kaj novaj eldonaĵoj

La universitatoj de Graz kaj Innsbruck, Aŭstrio, anoncas, ke konferenco okazos en Graz la 20-an kaj 21-an de septembro pri Rimedoj kaj Iloj por Edukado pri TKI:

<https://translationswissenschaft.uni-graz.at/de/itat/veranstaltungen/konferenzen/ressourcen-und-instrumente-der-translationsrelevanten-hochschuldidaktikresources-and-tools-for-ti-education/>

La Universitato de Mainz ĉe Gernersheim, Germanio, realigos konferencon en Tradukado kaj Interpretado kaj Lingvistiko, en kiu referaĵoj *ne* estu prezentitaj en la angla lingvo.

Rafael Schögler, el Graz, anoncas sian plej lastan libron (2019) *Circulation of academic thought: Rethinking translation in the academic field*, red. Rafael Y. Schögler, kontribuoj de Karen Bennett, Ŝebnem Susam-Saraeva, Hanna Blum, Barbara Grüning, Fabian Link, Dirk Kemper, Rafael Y. Schögler kaj Keith Tribe. <https://www.peterlang.com/view/title/68853>

Chuan Ding, el Köthen, Germanio, aperigis studon pri specimeno de germana-ĉina literatura tradukado: <http://www.frank-timme.de/verlag/verlagsprogramm/buch/verlagsprogramm/bd-102-chuan-ding-peterchens-mondfahrt-in-chinesischer-uebersetzung/backPID/transued-arbeiten-zur-theorie-und-praxis-des-uebersetzens-und-dolmetschens-1.html>

16. Listo de universitataj instruistoj kaj esploristoj kiuj konas Esperanton

La komisiono pri agado en universitatoj de ILEI starigis la liston, kiun vi povas vidi en [https://uea.org/vikio/Listo de universitataj instruistoj kaj esploristoj, kiuj konas Esperanton](https://uea.org/vikio/Listo_de_universitataj_instruistoj_kaj_esploristoj_kiuj_konas_Esperanton)

Tre verŝajne la listo ne estas kompleta. Se vi scias pri aliaj homoj, kiuj devus esti en la listo, bonvolu sendi informojn pri ili al la adreso <esperanto.en.universitatoj@gmail.com>. Ni ankaŭ volonte ricevas informojn pri kursoj pri Esperanto aŭ interlingvistiko en universitato, kiuj ne estas listigitaj ĉi tie: https://uea.org/vikio/Agadpunkto_1-a:_universitataj_kursoj_pri_Esperanto_a%C5%AD_interlingvistiko

17. Alilandaj esperantistaj instruistoj serĉataj por ĉina universitato

Universitato Zaozhuang estas grava loko por la Esperanto movado. Tie troviĝas Esperanto-Muzeo kaj Esperanto-fako kun kvarjara studo. Nun la universitato planas varbi iujn fremdlandajn esperantistajn instruistojn. Kandidatoj posedu doktoran diplomon, prefere scipovu la ĉinan, kaj prefere venu el angleparolanta lando. Interesantoj kontaktu kun mi!

-- Semio, dumviva membro de UEA kaj respondeculo de la muzeo. semio@163.com

18. Laborgrupo ILEI/ESF pri universitata agado

La 15-an de februaro kunsidis la laborgrupo de ILEI/ESF pri universitata agado: Angela Tellier, Renato Corsetti, Vicente Manzano-Arrondo kaj Radojica Petroviĉ, al kiuj dume aldoniĝis ankaŭ Ivan Colling. La grupo analizis konkludojn de sia antaŭa, januara skajpkunveno laŭ la antaŭe dissenditaj notoj de Radojica. La grupanoj konstatis progreson ĉe iuj punktoj kaj analizis fareblojn ĉe la aliaj. Kiel kutime, estis farita protokolo.

La grupo subtenis la ideon de ILEI el la januara estrarkunsido de ILEI, kiun Radojica prezentis al la grupo, pri okazigo de la *Dua Konferenco de universitatoj kie Esperanto kaj/aŭ interlingvistiko estas instruataj* en kadre de ILEI-kongreso 2020, kun la ĉeftemo *Interlingvistiko - paradigmoj, defioj kaj atingoj*, kiu ja estas kerna ankaŭ por ĉi tiu laborgrupo. Kunside en Les Brenets la Estraro interkonsentis prisondi, ĉu la Universitata Komisiono kaj ESF pretas subteni tian planon.

Marte estis decidita, ke la Prezidanto de TEJO (kaj samtempe observanto de TEJO ĉe ILEI kaj kunlaboranto de ILEI por junulara agado) Karina Oliveira eniros la Komisionon kaj la laborgrupon pri universitata agado por esplori pri eblecoj kaj manieroj kunagadi.

La 18-an de marto, 2019, okazis sekva skajpkunveno de la laborgrupo per Zoom. Partoprenis Tellier (ESF), Petroviĉ (ILEI), Manzano-Arrondo (ILEI), Colling (ILEI), Byelongo (ILEI), Corsetti (UEA), Oliveira (TEJO), Fettes (UEA), Grosjean (ILEI), Roy (ILEI).

19. Esperanto en la Ŝtata Universitato de Lokossa, Benino

Per oficiala kuriero N-ro 316/19/INSTI/DA/SGE/SA de la 6-a de junio 2019, la estro de la universitato de Lokossa aprobis la starigon de Esperanta grupo sine de la tiea Universitato.

Raportas Latifou Gbadamassi, Prezidanto de la Asocio de Beninaj Esperantistoj: “La klopodoj enkonduki la instruadon de Esperanto al pli alta nivelo komenciĝis la pasintan lernjaron, per peto direktita al la Direktoro de la nuna Nacia Altinstituto pri Industria Teknologio (Institut National Supérieur de Technologie Industrielle INSTI) de Lokossa, tiam Universitata Instituto pri Teknologio (IUT) de Lokossa. La celo estis starigi tie Esperanto-klubon. La 8-an de februaro 2018, reprezentantoj de la estonta klubo vizitis la Direktoron por prezenti Esperanton kaj ĝiajn avantaĝojn, UEA-n kaj ĝiajn strukturojn, fakajn

asociojn kaj la jarajn Esperantajn eventojn inkluzive de la Universala Kongreso. Rezulte, la Direktoro estis konvinkita kaj aprobis la ideon. Ni povis, sabaton la 21-an de aprilo 2018, okazigi la unuan kontakton kun studentoj. Tiu kontakto, kiu daŭris du horojn, arigis dek personojn kaj ebligis al ni ne nur prezenti la Internacian Lingvon sed ankaŭ gvidi provlecionon.”

20. Ukraina scienca konferenco

Prof. Nina Daniljuk nina_daniljuk@ukr.net informas (pri evento estonta, nun estinta): Scienc-praktika konferenco, dediĉita al la 30-a jubileo de UkrEA, okazos la 17-an de majo 2019 en la Biblioteko J. Mudrij (Kijivo, str. Hrushevsjkoho, 1). Komenco je la 10:00. La programo estas finpreparata. La organiza komitato persone kontaktis kun la prelegontoj kaj elektis la temojn de la prelegoj en la ukraina lingvo, kiuj estos interesaj kaj utilaj ne nur por esp-istoj, sed por neesperantista publiko. La sciencistoj el Akademio de Sciencoj, la profesoroj kaj studentoj el Kijiva Nacia Universitato Shevchenko, Kijiva Politeknika Instituto Sikorskij k.a., kies fakoj estas kunigitaj kun la interagado de la lingvoj kaj kulturoj, estas invitataj. Ĉiuj esperantistoj el diversaj lokoj de Ukrainio kaj aliaj landoj estas bonvenaj. Vi povas partopreni en la diskutoj, rigardi la ekspozicion de libroj, alporti interesajn materialojn ktp. Bonvolu veni kun viaj konatoj, parencoj, amikoj, kolegoj, ni ja faras gravan komunan aferon!

21. La iniciato Helsinki por plurlingveco en la scienca komunikado

Esplorado estas internacia. Tiel estu! Multlingveco vivtenas loke gravan esploradon! Ĝin protekti estas nia tasko! La disvastigo de esplorrezultoj en la propra lingvo de la esploranto kreas efikajn rezultojn. Tion ni subtenu! La interagado kun la socio kaj la divido de scio ekster la kadrojn de la scienca komunumo estas grava. Tio subtenindas! La infrastrukturo por scienca komunikado en la diversaj naciaj lingvoj estas fragila. Ni ne rajtas perdi ĝin!

La subskribintoj de la Helsinki-iniciato por plurlingveco en la scienca komunikado subtenas la jenajn rekomendojn akceptendaj de politikistoj, universitatoj, esplorinstitucioj, institucioj sponso-rantaj esploradon, bibliotekoj kaj esploristoj.

1. Subteno de la disvastigo de esplorrezultoj por atingi grandskalan socian utilon per certigo, ke esplorantoj ricevas rekompencan por disvastigo de esplorrezultoj ekster la kadrojn de la scienca komunumo kaj por interagado kun la prizorgantoj de tradicio, kulturo kaj socia vivo; certigo de samrajta aliro al esplorbazigita scio en multnombraj lingvoj.
2. Protekto de nacia infrastrukturo por la publikado de loke grava esplorado per certigo, ke publikutilaj sciencaj revuoj kaj eldonejoj disponas kaj sufiĉajn rimedojn kaj la necesan subtenon por povi garantii altan nivelon de kvalitkontrolado kaj honestecon de la esplorado; certigo, ke naciaj sciencaj revuoj kaj eldonejoj disponas sufiĉe kontrolitan kaj sekuran maŝinon aliri Open Access [Libera Aliro].
3. Subteno de lingva multspececo en la pritaksado kaj sponsorado de esplorado per

certigo, ke pritakso de la kvalito de esploralaboro fare de fakuloj okazas sen konsidero de la publikiga lingvo aŭ de la publikiga kanalo;
certigo, ke fakaj artikoloj kaj libroj en sistemoj de indeksodonanta pritaksado estas trakta taj samrajte sen konsidero de la uzita lingvo.

La Helsinki-iniciato por plurlingveco en la scienca komunikado estas iniciita de Tieteellisten seurain valtuuskunta (TSV) [finna] Delegacio de la Scienca Asocio], Tiedonjulkistamisen neuvot-telukunta (TJNK) [finna] Konsila komisiono pri publika informado], Suomen tiedekustantajien liitto [Finna Asocio de Sciencaj Eldonistoj], Universitets- og høøgskolerådet (UHR) [norvega] konsilio pri universitatoj kaj altlernejoj] kaj projekto de COST [Coopération européenne dans le domaine de la recherche scientifique et technique; Eŭropa Kunlaboro sur la kampoj de scienco kaj teknologio] "European Network for Research Evaluation in the Social Sciences and the Humanities" (ENRESSH).

La kampanjo „In all languages“ [en ĉiuj lingvoj] estas voksignalo al la politikistoj, universitatoj, esplorinstitucioj, institucioj sponsorantaj esploron, bibliotekoj kaj esploristoj subteni la plurlingvecon en la scienca komunikado. Partoprenu: Afiŝu ĉe Twitter kaj/aŭ Facebook vian deklaron aŭ filmeton montranta vian subtenon por plurlingveco en la scienca komunikado, kompreneble kun la signo #InAllLanguages ĉe Twitter kaj la titolo „InAllLanguages“ ĉe Facebook.

Tradukita de Peter Weide

www.helsinki-initiative.org

22. Olga Ŝiliaeva reĝisoros la kongresan temon en Lahtio



La Estraro de UEA elektis Olga Ŝiliaeva kiel reĝisoron de la kongresa temo de la 104-a Universala Kongreso en Lahtio (20-27 de julio 2019). La temo de la 104-a UK estas "Vivanta naturo, floranta kulturo".

Olga estis elektita interalie pro sia faka scio pri la rilatoj inter natura kaj lingva diversecoj, kongrua kono por laboroj ĉirkaŭ la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, kiel deklariĝis de

UNESKO. Laŭ profesio Olga estas ekonomikisto kaj universitata instruistino en Rusio. En la movado ŝi estis komisiito de TEJO pri Scienca kaj Faka Agado, verkis kaj tradukis en Esperanto pri ekonomiko kaj aliaj fakoj kaj laboris ankaŭ por la kultura kampo: en pluraj eventoj ŝi organizis lingvajn kaj poeziajn programerojn kaj gvidis instru- kaj trejnsesiojn; en 2013 ŝi estis premiita en la filmkonkurso Esperanto-125 kaj en 2014 en la filmkonkurso Teo kaj Amo, de kiu fine ŝi fariĝis kunorganizanto. La reĝisoro de la kongresa temo planas ĝian traktadon dum la UK kaj eventuale serĉas kontribuontojn. Komentojn, ideojn kaj proponojn pri la traktado de la temo oni povos sendi al Olga per la retadreso lenska_shilyaeva@mail.ru.

Pli pri la kongresa temo oni vd. la Gazetaran Komunikon de UEA n-ro 764 (2018-11-02):

uea.org/gk/764a1.

[Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 790, 2019-03-28]

23. Juna esperantisto alparolis la Junularan Forumon de EKOSOK: Aŭskultas Antonio Guterres

Komence de aprilo ekis en Novjorko la 8a Junulara Forumo de EKOSOK, ĉe Unuiĝintaj Nacioj, Novjorko. Jam de kvar jaroj TEJO aktive partoprenas en ĝi, kaj kontribuas en la rilatoj kun UN kaj en la gvidado de IKRJO - kunordigorgano por regionkontinentaj junularaj platformoj kaj por tutmondaj junularaj organizaĵoj.



Ĉi jare estis aparta jaro: TEJO ne nur partoprenis en la forumo, sed la ĉefparolanto por la junularo dum la Fermo de la Forumo estis Rakoen Maertens, kiu faris siajn rimarkojn en ĉeesto de la Ĝenerala Sekretario de UN, Antonio Guterres. Tio estas tre grava rekono por la Esperanto-movado, por la agado de TEJO ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj por la kvalito de niaj aktivuloj. Entute sep homoj partoprenis la delegacion de TEJO.

Vidu https://tubaro.aperu.net/v/ytb_T-YQHETQd6k/.

La parolado de Rakoen Maertens estas spektebla ĉe <https://www.youtube.com/watch?v=tyrzs8QesAU>

24. Esperanto ne evoluas?

En la franca radio France Culture antaŭ kelkaj tagoj estis elsendita interparolado kun la grekisto kaj filozofo Heinz Wismann kaj iu alia. Wismann interalie asertis, ke Esperanto **ne estus evoluigebla lingvo**, ĝi estus **fermita lingvo** (do senŝanĝa) kaj ke **neniu volus uzi Esperanton**. Tion France Culture ĉe Twitter sub "Culturesmonde" eĉ aparte elstarigis.

<https://twitter.com/CulturesMonde/status/1108677195638210560>

En la elsendo aŭskulteblas ankaŭ, ke Esperanto estus serva **lingvo de malalta nivelo**.

"Eh bien, l'espéranto n'a pas pris, parce que c'est une langue de service de bas niveau".

(Proksimume: Esperanto ne akceptiĝis pli vaste, ĉar ĝi estas serva lingvo de malalta nivelo.)

La elsendo okazis je ĵaŭdo 21 marto 2019 inter la 11-a horo kaj 11h55. Ĝi aŭskulteblas (aktuale ankoraŭ) ĉe

<https://www.franceculture.fr/emissions/cultures-monde/guerillas-linguistiques-44-de-babel-a-google-traduction-vers-un-nouveau-langage-universel>

Pri Esperanto ekde minuto 23:10 dum proks. unu minuto (transskribita teksto sube en la franca kaj Esperanto).

Mi tre ĝojos, se vi bonvolos atentigi al France Culture, ke tiuj asertoj estas malveraj - aŭ, pli bone, en pozitiva varianto:

Esperanto estas evoluanta lingvo kaj ĝi estas uzata tutmonde, ekzemple en vikipedio kaj en Facebook.

Esperanto estas rekonita de la PEN-centro, de la pola kaj kroata ŝtatoj kiel nemateria kultura heredaĵo kaj ĉiutage uzata de Ĉinio en novaĵoj ĉe <http://esperanto.china.org.cn/>. -- **Lu Wunsch-Rolshoven**

25. Grant Goodall kaj Lee Miller estis elektitaj al la Akademio de Esperanto



Grant Goodall estis ĵus elektita al la Akademio de Esperanto kun naŭ-jara mandato. Lerninte Esperanton kiel gimnaziano, Grant laboras volontule en ESF jam dum multaj jaroj, kiel estrarano ekde 2001 kaj nuntempe kiel Vic-Prezidanto. Li estas profesoro pri lingvistiko en la Universitato de Kalifornio en San Diego, kie li estas esploristo pri la sintakso de homa lingvo kaj pri lingvoakirado. Lia esplorklaboro inkluzivas studojn pri la strukturo de Esperanto kaj li ofte instruas kurson pri la historio de konstruitaj lingvoj kaj pri la scienco malantaŭ ili. La Akademion de Esperanto oni fondis en 1905 kun la celo gvidi kaj kontroli la evoluon de la lingvo. La 45 membroj de la Akademio estas internacie konataj pro siaj kontribuoj al la literaturo, la esplorado, kaj la instruado.



Ankaŭ Lee Miller, konata Usona aktivulo, kaj nun organiza konsilanto al ESF, estis elektita al 9-jara mandato en la Akademio. Lee lernis Esperanton kiel 16-jarulo (antaŭ pli ol 50 jaroj!), kaj ekde tiam restas aktiva membro de ELNA/E-USA, kaj UEA. Li komencis partopreni la Usonan someran kursaron de Esperanto (nun konatan kiel NASK) en 2000, kaj li estas kerna parto de la organiza teamo. Post la apero de Duolingo, li komencis roli kiel administranto kaj ĉefa lingvo-konsilanto en granda grupo ene de Fejsbuko (Duolingo Esperanto Learners). Lee havas spertojn unue kiel profesia flegisto (inkluzive de universitata instruado en tiu fako), kaj poste kiel interpretisto de la Usona gesto-lingvo.

26. Pli bona etoso por multlingvismo ĉe Unuiĝintaj Nacioj

En mesaĝo de aprilo 2019 al la subtenantoj de Esperanto ĉe UN, la ĉefrepresentanto de Universala Esperanto-Asocio ĉe UN, Humphrey Tonkin, skribis jene:

Kvankam la vojo al agnosko de Esperanto ĉe UN – aŭ eĉ agnosko, ke ekzistas signifa lingva dimensio en la laboro de UN – estas longa, la lingva klimato (por tiel diri) signife pliboniĝis sub la gvido de la nuna Ĝenerala Sekretario Antonio Guterres. Mem poligloto, li sincere interesiĝas pri lingva egaleco kaj pri la glatigo de la lingva komunikado.

Ĉi tie mi volas mencii kelkajn retajn ligojn kiuj eble interesos tiujn esperantistojn kiuj siavice interesiĝas pri UN. Plejparte temas pri relative novaj retejoj kiuj antaŭe tute ne ekzistis. Mi citas la anglalingvajn versiojn, sed kutime ekzistas franclingvaj kaj kelkfoje pliaj versioj.

Bona komencopunkto estas

<https://libraryresources.unog.ch/multilingualism>

Multilingualism at the UN: Selected Resources

Tie vi trovos ligojn al amaso da diversa materialo, interalie materialo kiu spuras la ne ĉiam facilan historion de multlingvismo en UN. Mi rekomendas tiurilate la plurajn novajn videofilmojn pri multlingvismo, ekzemple

https://www.youtube.com/watch?v=rJABMq07Rps&list=PLwuEGUpq0g-jFNbChnkmB6q_Bh6znaS1y

Tiu filmeto ekzistas en versioj angla, araba, franca, hispana kaj rusa

Sed ĉefe, mi menciuj la tutnovan raporton de la Ĝen. Sek. pri multlingvismo, kiu aperis en februaro 2019 kaj ankoraŭ ne leviĝis en la tagordo de la Ĝenerala Asembleo (tio okazos pli malfrue en la jaro). La raporto estas detala, larĝa kaj informriĉa – certe kompare kun pasintaj tiaj raportoj. Vi trovos ligon al la raporto ĉe la supremenciita ligo:<https://libraryresources.unog.ch/multilingualism>

Ene de la oficejo de la Ĝen. Sek. ekzistas unuo kiu okupiĝas pri la antaŭenigo de multlingvismo sub gvido de Kunordiganto de Multlingvismo:

<https://www.un.org/sg/en/multilingualism/index.shtml>

UN Secretary General Coordinator for Multilingualism

Vidu ankaŭ

<http://www.un.org/Depts/DGACM/multilingualism.shtml>

DGACM Coordination of Multilingualism

Kaj pri multlingvismo en la UN-oficejo en Ĝenevo:

[https://www.unog.ch/unog/website/unog.nsf/\(httpPages\)/BBE1B4AA24F2A448C1257CF500560904?OpenDocument](https://www.unog.ch/unog/website/unog.nsf/(httpPages)/BBE1B4AA24F2A448C1257CF500560904?OpenDocument)

Plejparte temas pri streboj de UN trakti siajn ses laborlingvojn egale – afero en si mem komplika, kiel ilustras ĉi tiu instrukciaro pri la kreo de multlingvaj retejoj:

<https://www.un.org/en/sections/web-governance/minimum-standards-multilingualism-united-nations-websites/index.html>

Sed la raporto de la Ĝenerala Sekretario montras klopodojn diversigi la uzatajn lingvojn preter tiu sankta seso.

Se temas pri la pozicio de UEA, ni faras nian eblon labori ene de la strukturoj de la UN-organizaĵo.

Iniciatoj en pasinteco konvinki UN akcepti Esperanton malsukcesis – parte pro tio, ke nek la Esperantomovado nek UN pretis por tia solvo. Se oni ne rekonas la problemon, apenaŭ eblas akcepti la solvon.

UEA do ĉefe laboras por altigi la konscion de UN pri la lingva dimensio de ĝia laboro – kaj en tiu laboro ni havas la apogon de la Ĝenerala Sekretario...

Ĉiujare, UEA, kunlabore kun ESF kaj CED kaj kun aliaj organizaĵoj, aranĝas en Novjorko simpozion pri lingvoj kaj UN. Ĝi tion faras pere de la tegmenta Studogrupo pri Lingvoj kaj UN, en kiu UEA kaj ESF estas la ĉefaj motoroj. Ĉi-jare tiu simpozio okazos la 9-an kaj 10-an de majo. Vi povas legi pri ĝi anglalingve ĉi tie:

<http://languageandtheun.org/events.html>

esperantlingve ĉi tie:

<http://www.esperantoporun.org/dokumentoj/informiloj/informilo-de-marto-2019/>

kaj franclingve ĉi tie:

<http://fr.esperantoporun.org/documents-fr/lettres-dinformation/lettre-dinformation-pour-mars-2019/?hlang=eo>

La pasintjara simpozio vekis konsiderindan intereson ene de UN. Ĉe languageandtheun.org vi povos legi ĝian raporton.

27. Blogo traktas Esperanton kaj estontajn aranĝojn

Skribas Peter Baláž peter.balaz@ikso.net, kunordiganto de la programo E@I:

Mi ŝatus proponi kelkajn temojn, kiuj povus interesi vian legantaron. Jen ni verkis pri ili en nia blogo:

<https://ikso.net/nova-projekto-de-mozilla-eblogos-al-masinoj-paroli-en-esperanto/>

kaj ankaŭ tio ĉi estus laŭ mi menciinda:

<https://ikso.net/polyglot-gathering-2019-la-trian-kaj-la-lastan-fojon-en-bratislavo/>

pri la nova evento "SEP": https://revuoesperanto.org/ses_sep

Certe indus skize mencii ankaŭ pri SES: dum ĝi ankaŭ okazas pluraj IPI-rilataj prelegoj/programeroj) Estus interese mencii ankaŭ pri "LingvaFest'2019" - kiun organizos E@I septembre en Slovakio - temas pri la unua kaj sola internacia lingva festivalo, 2-lingva evento kun pli ol 100 programeroj, inkluzive rapidkursoj de 20-30 lingvoj (inkluzive artefaritaj) ktp.

lom da detaloj pri tio en EO: <http://www.lingvafest.sk/eo/>

28. Esperantologia Konferenco de CED en Lahti

Orlando Raola, estrarano de CED, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, anoncis la ĉi-jaran programon de la Esperantologia Konferenco, kiu okazos kiel kutime dum la Universala Kongreso de Esperanto, plej verŝajne en la kongresa ĵaŭdo, kun jena programo:

9:00-9:15 Bonvenigo (Orlando Raola)

9:15-10:00 *Komunika facileco desupre planita kaj spontanee evoluinta: komparo de kelkaj aspektoj de la planlingvo Esperanto kaj la piĝino Tok Pisin* (Bengt-Arne Wickström)

10:00-10:45 *Indiĝenaj lingvoj parolataj en Brazilo kaj ties studoj dum la dudeka jarcento* (Karina Oliveira)

10:45-11:15 Paŭzo

11:15-12:00 *Kiel Esperanto helpus eviti la morton de lingvoj?* (François Lo Jacomo)

12:00-12:45 Surpodia diskuto: *La estonteco de esperantologio kaj interlingvistiko* (diskuto prepare al la kongresfina kolokvo de CED, sub gvido de Humphrey Tonkin)

12:45-13:00 Konkludo kaj planado por venonta jaro (Orlando Raola)

29. Kolokvo en Lahti -- Esperantologio kaj Interlingvistiko: Venontaj Paŝoj

Kiam ESF kunvokis Nitobe-Simpozion en Lisbono pri la instruado kaj esplorado pri Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj, eble la ĉefa konkludo estis, ke indus pli ofte okazigi tiajn diskutojn. La grupo de homoj (kvindeko entute) kiuj kunvenis en Lisbono en aŭgusto 2018 kune aŭdis pri lastatempaj evoluoj, interŝanĝis spertojn, kaj planis kunlaboron. Temis pri utila kunveno ripetinda.

Pro tio, CED, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, decidis kunvoki plian renkontiĝon sabaton la 27-an de julio 2019 tuj post la Universala Kongreso de Esperanto. La renkontiĝo komenciĝos per komuna lunĉo kaj finiĝos per komuna vespermanĝo, dank' al financa kontribuo de ESF.

Kvardeko da fakuloj kaj specialistoj akceptis la inviton de CED ĝis nun:

Yevgeniya (Ĵenja) Amis, Joel Amis, Anna Bennett, Thomas Bormann, Duncan Charters, Renato Corsetti, Probal Dasgupta, Enrique ElleMBERG, Mark Fettes, Mireille Grosjean, Tuomo Grundström, Nikolao Gudskov, Paul Hopkins, Maria Hopkins, Yinbao Huang, Dennis Keefe, Christer Kiselman, Katalin Kováts, Peter Kühnel, Ulrich Lins, François Lo Jacomo, Anna Löwenstein, Fernando Maia, Rakoen Maertens, Francesco Maurelli, Chuck Mays, Brian Moon, Claude Nourmont, Olof Pettersson, Jukka Pietiläinen, Barbara Pietrzak, Philippe Planchon, Otto Prytz, Marianne Lund, Orlando Raola, Dima Shevchenko, Anna Striganova, Humphrey Tonkin, Bernhard Tuidler, Nicolas Viau, Xiaofeng Gong.

Prezidos Humphrey Tonkin, en sia rolo kiel direktoro de CED.

Oni antaŭvidas jenan programon (en la Hotelo Scandic Lahti City, Kauppakatu 10, Lahti)

12.00 – 13.00: Alveno – libera diskutado

13.00 – 14.00: Lunĉo (salataĵoj, pano, kafo/teo) servita en la kunvenĉambro

14.00 – 14.30: Enkonduko de Humphrey Tonkin: Konkludoj de la Nitobe Simpozio en Lisbono, 2018.

14.30 – 15.00: - tabla/grupa diskutado, temo aranĝota

15.00 – 15.30: - tabla/grupa diskutado, temo aranĝota

15.30 – 16.00: - tabla/grupa diskutado, temo aranĝota

16.00 – 16.30: - tabla/grupa diskutado, temo aranĝota

16.30 – 17.00: Paŭzo

17.00 – 18.00: Mark Fettes: Unuiĝintaj Nacioj -- ĝia kaj nia agado, la 75-a datreveno kaj la venontjara Universala Kongreso (kun tablaj diskutoj)

17.30 – 18.00: Orlando Raola: Revuo *Esperantologio* kaj ĝia estonteco

18.00 – 19.00: Tutgrupa diskuto, konkludoj, rekomendoj – Kien nun?

19.15 – 21.00: Bufeda vespermanĝo en Restoracio Torilla (en la hotelo)

Kunordigas la aranĝon Angela Tellier (angela.tellier@esperantic.org), al kiu vi adresu eventualajn demandojn.

30. Estraro de ESF kunsidis en Bostono

La estraro de Esperantic Studies Foundation okazigis sian jaran planan kunsidon la 13-an kaj 14-an de junio 2019, en la kadro de la ĉi-jara kongreso de Esperanto-USA kaj Kanada Esperanto-Asocio. Ĉeestis la ĉefdirektoro Chuck Mays, komisiito pri publikaj rilatoj Ĵenja Amis, kaj estraranoj Humphrey Tonkin, Derrick Roff, Anna Bennett, Mark Fettes kaj Ben Speakmon. Partoprenis elektronike estraranoj Wallace Du Temple, Esther Schor, Grant Goodall, kaj komisiito pri esploroj Angela Tellier.

Sub la diligenta kaj efika administrado de Chuck Mays, la agado de ESF plivastiĝas kaj pliefikiĝas. La buĝeto de la fondaĵo restas en ekvilibro, kaj la fondaĵo mem prizorgas siajn konstantajn proprajn programojn (edukado.net, NASK k.a.) kaj distribuas monhelpon al individuaj esploristoj kaj al organizaĵoj tiel diversaj kiel Universala Esperanto-Asocio, ties Universala Kongreso, CED, kaj la Universitatoj Adam Mickiewicz, Princeton, Massachusetts kaj William Peace. Nova komuna donacvarba programo donas rektan helpon al Esperanto-USA.

La fondaĵo planas enkonduki en 2020 fiksajn limdatojn por subvencioj. Ĝia laboro daŭre evoluos sub tri ĉefaj temoj: esplorado, edukado, kaj konservado. La unua (esplorado) celas pligrandigi, progresigi, kaj pliprofundigi esplorojn pri esperantologio, interlingvistiko, planlingvoj, lingva justeco kaj rilataj temoj. La dua (edukado) celas starigi kaj subteni la instruadon de Esperanto, interlingvistiko, lingvopolitiko kaj rilataj temoj, ĉefe je universitata nivelo, sed ankaŭ per aliaj rimedoj kaj en aliaj situacioj.

La tria (konservado) estas relative nova iniciato, kiu celas konservi dokumentojn, presitajn librojn kaj aliajn materialojn el la historio de Esperanto kaj interlingvistiko. En tiu rilato ESF kunlaboras proksime kun la universitatoj Princeton kaj Massachusetts, kaj kun la Biblioteko Hodler en Roterdamo kaj la Aŭstria Nacia Biblioteko (ties planlingva kolekto) en Vieno.

www.esperantic.org

Eldonas Ipi: Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Ĉi tiun numeron redaktis: Humphrey Tonkin kun helpo de Angela Tellier kaj Yevgeniya (Ĵenja) Amis. Redakcio (kontribuoj, ricevado de la bulteno, k.s.): ipi@esperantic.org. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. <https://twitter.com/esperanticsf>, <https://www.facebook.com/esperantic/>
